Scienca eĥo

## Ekonomiaj meĥanismoj kontraŭ blindeco

Dek unu milionoj da personoj en Hindujo estas blindaj, en 80% de la okazoj kaŭze de katarakto. La nekomplikan, nur dek minutojn daŭran operacion por la restarigo de la okula vidkapablo preskaŭ neniu senrimeda hindo povas permesi al si. Pro tio la sociala entreprenisto *Govidappa Venkatuswamy* fondis, en la jaro 1976, la *Aravind*-Okulhospitalon kun tre lerte pripensita entreprena modelo. Hodiaŭ, tie senmonaj pacientoj ricevas sian operacion senkoste (ekde la fondiĝo jam 2,4 milionoj da homoj) – sed samtempe la malsanulejo ofertas "unuaklasan kuracadon" al riĉaj pacientoj posedantaj multe da propraĵo. Tiuj venas de tre foraj regionoj por ricevi la kuracadon de eksterordinare spertaj doktoroj en la okulhospitalo. Pro tio, *Aravind* povas labori ne nur spez-ekvilibre, sed ankaŭ realigi siajn ambiciajn planojn: ĝis la jaro 2015 oni celas operacii ĉiun jaron unu milionon da pacientoj.

La *Aravind*-Okulhospitalo estas ekzemplo, kiel socialentreprenistoj en plej diversaj landoj povas kontraŭagi plej diversajn medicinajn defiojn kaj socialajn provokojn pere de plej diversaj ideoj kaj inklinoj. Kelkaj el ili laboras profitorientitaj, aliaj nur elspezkovraj. Komuna al ili tamen estas la celo, daŭropove kaj efike forigi socialajn, ekonomiajn, medicinajn kaj ekologiajn mankojn aŭ malfunkciojn helpe de ekonomiaj meĥanismoj.

(*Süddeutsche Zeitung* n-ro 168, 2009-07-24, p.18)

## Poligloto

Kiel plej granda lingvogeniulo de ĉiuj tempoj estas rigardata la Bolonjano *Giuseppe Mezzofanti* (1774-1849). Laŭ fidindaj raportoj li perfekte majstris 34 lingvojn. Ĉe pluaj 40 lingvoj li onidire nur "faris okaze malgrandajn erarojn".

*Mezzofanti* estis katolika ekleziisto, profesoro pri arabaj lingvoj, kaj fariĝis en 1839 kardinalo. Unue liaj grandaj avantaĝoj estis, ke li, kiel ŝatata konfes-prenanto en la Vatikano, povis "lerni la plej multajn lingvojn en la konfesprena seĝo". Italujon li neniam forlasis. Krom la multaj lingvoj, li majstris ankaŭ ĉ. 50 dialektojn – inter ili unu, kiu ĉiam gravas en la katolikeco: la "kolonjan" (t.e. germana dialekto, ofte ŝerce imitata, parolata en la sever-katolika urbo *Köln* = Kolonjo, kvazaŭ aparta idiomo). (2007-10-10)



## Islanda enigmo pri seksdiferenco

"Fine de aŭgusto eŭropaj kardiologoj kongresis en Barcelono. *Thororinn Gudnason* kiel estro de la esplorgrupo komunikis frapan rezulton de fummalpermeso en publikaj ejoj en Islando: ekskluzive inter viroj nefumantaj malmultiĝis la kazoj de korinfarkto je eĉ 21 procentoj! En Islando regas fummalpermeso ekde la unua de julio 2007 en restoracioj, kafejoj kaj aliaj servejoj, ĝenerale en publikaj konstruaĵoj. Tia sukceso alimaniere estus atingebla nur per forta kardiovaskula terapiado. (Ja ankaŭ pasiva kunfumado mortigas, laŭ delongaj konstatoj. Noto de la redaktoro). Esplorenda restas la kialo, ke ĉe virinoj ne malpliiĝis la nombro da infarktoj."

Tio nialingve legeblas en "PP 09/3". Samanumere, do en "Puraj Pulmoj" (la organo de la nefumisma TADEN), sci-aviduloj trovas interesaĵojn pri seksdiferenco: Ne nur ke viroj pli emas ignori la signalojn de malsanoj kiel kancero, sed precipe pri la rolo de niaj nervaroj: ĉe viroj superas la simpato, kiu tenas nin ekscititaj – kun la konsekvenco ke ni pli frue elĉerpiĝas; male virinojn regas la parasimpato, kiu ĉe danĝero (eĉ eta dozo da tabakfumo en la koncerna eksperimento) "digestigas" la streson.

Kiel malklera laiko la redaktoro de PP supozas ke tio klarigas la islandan problemon: la korpa graso, necesa por nutri fetojn kaj bebojn, havigas al la aminda sekso ankaŭ malpli rapidan forbruligadon de la korpgrase konservataj venenoj, el kio rezultas malpli baldaŭa profito el pli pura ĉirkaŭa aero, kiel en ejoj lastatempe senfumiĝintaj.

(el "NID-Info 09/2", la informilo de Nefumant-iniciato Germanuja: *Nichtraucher-Initiative Deutschlands*) –mo

## La Ora Cinklo

Estas bone, ke la homo kelkfoje posedas sufiĉe da memekkono kaj komprenemo por korekti faritajn erarojn: ekzemple restaŭre naturigi la artefarite rektigitan riveron Izaro (*Isar*), ĉe kiu situas la granda urbo Munĥeno en Germanujo. Se tio ne estus okazinta, la Munĥenanoj nuntempe certe ne povus ĝui la ĉeeston de la ora cinklo (*Cinclus cinclus*), kiu en la germana lingvo nomiĝas *Wasseramsel*, do "akvocinklo".

Tiu ĉi birdo fakte tute ne apartenas al grandurboj: ĝi normale vivas ĉe klaraj montoriveroj kaj montaraj rojoj. Sed precipe la re-

naturigita Izaro ŝajnas esti tiom alloga por la akvocinklo, ke ĝia ĉeesto intertempe jam kreskis al ĉirkaŭ 20 kovparoj. Kiu volas observi ilin, tiu bone esploru la pontojn. Ĉar la ora cinklo amas super ĉio la pontojn. De la pontaj pilieroj ili saltas en la akvon por serĉi la tie vivantajn insektojn, kaj ili ŝatas kovi en la pontoniĉoj.

Pro tio la Landa Ligo por Birdoprotektado opinias tute probable, ke la akvocinklo jam je la fondiĝo de la urbo – do antaŭ 851 jaroj – loĝis en la ponto de la reĝo "Henriko la Leono". Tiel vidite, la ora cinklo estas "la unua munĥena urbobirdo"...

Ĉiuokaze tiu ĉi birda ulo estas iu speciala. Ĝi estas, malgraŭ sia nomo, ne akvobirdo sed kantobirdo, kiu evoluigis unikan strategion por subakva ĉasado. La akvocinklo uzas siajn flugilojn kiel remilojn aŭ direktilo kaj lasas sin kunpreni per la riverfluo, ĝis super la insektoriĉan akvogrundon. La merĝo en kvieta lago do estus por ĝi multe pli fortostreĉa ol en torente fluanta montorivero.

Plue, la birdo restas fidela al iam elektita ĉasregiono – kun la malavantaĝo ĉiam havi la saman najbaron. Kaj tiun ĉi ĝi tute ne ŝatas – je la ĝojo de bird-esploristoj, ĉar tiuj uzas la eternkverelajn najbarajn konfliktojn por detale esplori kaj difini la ekzaktan grandon de la birda ĉasad-tereno. (*Süddeutsche Zeitung* n-ro 160, 2009-07-24, p.N1)

## Evoluo nedarvina


La aztekoj kaj majaoj pensis, ke la suno, sub kiu ni vivas, jam estas la kvina. La antaŭaj kvar sunoj – kaj kun ili la homoj, kiuj vivis sub ili – jam antaŭ longa tempo pereis.

La unua suno lumis sur homoj, kiujn formanĝis ocelotoj.

La dua suno estis "suno de la aero"; kiam ĝi subiris, la homoj transformiĝis al simioj.

Sub la tria suno, la "suno de la fajro", ĉiuj vivantaj estaĵoj mortis, escepte la birdoj, kiuj povis forflugi. Kiel kvara suno, la "suno de la akvo", naskis la fiŝojn dum ĉiuj aliaj vivestaĵoj dronis en grandega torento. Nun brilas la kvina suno kaj ĉiujn partojn de la kreado junte kuniĝas. Sed tute klarsence estis kaj por la aztekoj kaj por la majaoj: la kreado ankoraŭ ne finiĝis – ankaŭ tiu ĉi suno iam estonte subiros. (2009-12-15)





## Kial ne, unufoje kaj por ĉiam, "Venecio"?

La usonanoj veturas al *Venice*, la francoj al *Venise*. La germanoj al *Venedig*, la poloj al *Wenecja*, la nederlandanoj al *Venetië* – la landanoj loĝas en *Venezia*. Kaj tamen ĉiuj parolas pri la sama urbo. Diferencaj lingvoj kaŭzas diferencajn geografiajn nomojn kaj diferencajn skrib- kaj elparolmanierojn de lokoj. Tiun ĉi babilonan nomdiversecon iom post iom majstri jam delonge estas la celo de multaj esperantistoj. Tamen, en Esperantujo oni pririd(et)-as tiujn personojn, kaj tiu, kiu (denove?) levas la demandon pri "propraj nomoj" en interesperantistan diskuton, estas moke prifajfata – kaj Eŭropo por eterne aspektos kiel la ĉi-supra mapo. Kun malmulte da espero por iom pli drasta ŝanĝiĝo al nepre necesa solvo de malplaĉa kaj malinternacilingva afero.

Ankaŭ landaj instancoj okupiĝas pri tiu ĉi temo. Ili ne celas internacilingvan nom-konformiĝon kiel la esperantistoj, sed serĉas solvon nur por la propra nacia lingvo mem. Kiel ekz. dum okazaj konferencoj de Unuiĝintaj Nacioj pri normigado de geografiaj nomoj. Tieaj temoj estas interalie la uzo de endonimoj (= la nomo de loko en la tie parolata lingvo, ekz. itallingve "*Venezia*") kaj la